XIII ORDINARA TEMPO – 27AN DE JUNIO 2010

LI ALPRENIS LA FIRMAN DECIDON EKVOJI AL JERUSALEMO. MI VIN SEKVOS KIEN AJN VI IROS – Komento al Evangelio de p. Alberto Maggi OSM

Lk 9,51-62

Dum plenumiĝadis la tagoj dum kiuj li estintus alten levita, Jesuo alprenis la firman decidon ekvoji al Jerusalemo kaj sendis heroldojn antaŭ si.

Tiuj ekmarŝis kaj eniris iun vilaĝon de Samarianoj por pretigi lian eniron. Sed ili ne volis lin akcepti, ĉar li estis klare paŝanta al Jerusalemo. Kiam ili tion vidis, la disĉiploj Jakobo kaj Johano diris: «Sinjoro, ĉu vi volas ke ni diru ke malsupreniru fajro el la ĉielo kaj ilin forkonsumu?». Li turnis sin kaj ilin riproĉis. Kaj li plumarŝis al alia vilaĝo.

Dum ili paŝadis surstrate, iu diris al li: «Mi vin sekvos ĉien ajn vi iros». Kaj Jesuo respondis al li: «La vulpoj havas siajn rifuĝejojn kaj la birdoj de la ĉielo siajn nestojn, sed la Filo de homo ne havas kie kuŝigi la kapon ».

Al iu alia li diris: «Sekvu min ». Kaj tiu respondis: «Sinjoro, permesu al mi antaŭe iri enterigi mian patron». Kaj li replikis: «Lasu ke la mortintoj enterigu siajn mortintojn, vi male iru kaj anoncu la Dian regnon».

Iu alia diris: «Mi vin servo, Sinjoro; antaŭe tamen lasu ke mi prenu forpermeson de miaj samhejmuloj». Sed Jesuo respondis al li: «Neniu kiu prenas la plugilon kaj poste rigardas malantaŭen, estas taŭga por la regno de Dio».

Por kompreni la mesaĝon de la evangeliistoj oni devas realkrociĝi al ilia lingvo kaj al ilia kulturo. Estas iu dirmaniero kiun ni trovas en la Antikva Testamento kiu estas “turni la vizaĝon al iu” kiu indikas malamikecon. Ekzemple en la libro de profeto Jeremio legeblas “Mi turnas mian vizaĝon kontraŭ tiu urbo” kaj la urbo estas Jerusalemo.

Aŭ en la libro de profeto Ezekielo al kiu ni vidos ke la evangeliisto referencas, la Sinjoro diras “Filo de Homo turnu la vizaĝon al Jerusalemo kaj parolu kun ĝia sanktejo”. Do, tion sciante, ni klopodu kompreni la mesaĝon de la evangeliisto.

“Dum plenumiĝadis la tagoj dum kiuj li estintus alten levita”, la evangeliisto jam anoncas la morton, sed samtempe la ekzaltadon de Jesuo. “Jesuo alprenis la firman decidon”, laŭlitere la evangeliisto skribas “li malmoligis sian vizaĝon”. Li referencas al tiu ĉi dirmaniero kiun ni antaŭe diris “turni la vizaĝon kontraŭ iu”, do la sinteno de Jesuo estas malamika. Kaj ne nur, la evangeliisto diras “ankaŭ li malmoligis sian vizaĝon”.

La rilato, al kiu ĝi estas? La rilato estas al Ezekjelo, la Filo de homo kiu turnis sian vizaĝon kontraŭ Jerusalemo, kontraŭ ĝia sanktejo. “Kaj li ekvojis al Jerusalemo”; Jerusalemo estas citata kiel Ierusalem, kiu indikas la sanktan urbon, la religian institucion, ne kiel Ierosolima, kiu indikas la geografian urbon.

Do Jesuo surprenas la decidon iri kolizii kun la centro de la religia kaj juda institucio. “Kaj li sendis heroldojn” la greka vorto estas “anĝelo” kiu signifas heroldo, “antaŭe” sed ne ‘antaŭ si’. La evangeliisto skribas laŭlitere “antaŭ sia vizaĝo”, tio estas tiu malmoligita vizaĝo, tiu vizaĝo kiu promesas kolizion kun la religia institucio.

“Tiuj ekmarŝadis kaj eniris en iun vilaĝon de Samarianoj”. Ni scias ke inter la Samarianoj kaj judeoj ne estis simpatio, eĉ ili interbatadis serioze, sed la Samarianoj en tiu ĉi evangelio, tiu de Luko, ĉiam aspektas plej bone, ili estas ĉiam prezentataj en favoran lumon.

“Pro pretigi lian eniron. Sed ili ne volis lin akcepti”. Kial ili ne volis lin akcepti? Tio diras la evangeliisto. “Ĉar li klare estis iranta al Jerusalemo”. Sed la heroldoj ne diris kiel, ili nur diris ke li estas iranta al Jerusalemo; ŝajnas ke la Mesio eniras triumfanta en Jerusalemo, aklamata kiel la filo de Davido, li prenas la povon kaj poste submetas ĉiujn paganajn popolojn kaj, en tiu kazo, ankaŭ la submetigo de la Samarianoj.

Jen kial la Samarianoj ne volas lin akcepti, “sed kiel, vi iras al Jerusalemo por preni la povon kaj poste vin turni kontraŭ ni, estas evidente ke ni baras al li la pordon!”.

Sed la heroldoj ne diris ke Jesuo iras “kontraŭ Jerusalemo”, ili uzis tiun dirmanieron “malmoligi la vizaĝon”. “Kiam tion vidis la disĉiploj Jakobo kaj Johano…”, Jakobo kaj Johano estas evidentigitaj de la evangeliisto pro ilia fanatikeco, ilia fervoro – en la evangelio de Marko ili estas nomataj “filoj de la tondro” – “...diris: «Sinjoro, ĉu vi volas ke ni diru ke malsupreniru fajro el la ĉielo kaj ilin konsumu? »”

Tiu estas citaĵo de profeto Elija. Profeto Elija estas tiu kiu estis tre fervora por Dio, la terura profeto kiu punadis siajn malamikojn, kiuj pluvigis de la ĉielo fajron kaj punadis siajn malamikojn. “Jesuo turniĝis kaj ilin riproĉis”, ilin riproĉis. La verbo estas tiu uzata por la demonoj; do Jesuo pensas ke ili estas kiel posedataj de tiu ideologio fanatika, religia, naciista ideologio kiu malpermesas al ili kompreni la planon de la Dia projekto.

“Kaj ili ekmarŝadis al alia vilaĝo”, do ni estas en Samario. La reago de Jesuo al la sinteno de la disĉiploj estas ke ĉifoje li alvokas lin sekvi eĉ la Samarianojn kaj ili estos tiuj kiuj poste sukcesigos lian mesaĝon.

Do la reago de Jesuo estas alvoki ĝuste la Samarianojn, sur kiujn male Jakobo kaj Johano volis malsuprenigi la fajron el la ĉielo. Kaj la evangeliisto prezentas ĉi tie tri anonimajn rolantojn – la nombro laŭ stilo de Luko simbolas la totalecon. Al kiuj Jesuo petas radikalan rompon kun la pasinto, por la hejmo, la familio kaj, precipe, kun la patro kiu reprezentis la tradicion.

Do al la unua – ili marŝadis surstrate – de Samario kiu sin deklaras preta sekvi Jesuon, Jesuo diras: “la vulpoj kaj la birdoj” kiuj estis konsiderataj la plej sensignifaj kaj senutilaj bestoj. Do la plej senutilaj estaĵoj havas rifuĝejon, *«*sed la Filo de homo», kaj estas tiu homo kiu realigas en si la dian projekon, *«* ne havas kie kuŝigi la kapon*»,* tio signifas do la kompletan flankenigon, nekomprenon.

Al iu alia estas Jesuo mem kiu adresas la inviton, li diras al li *“«*Sekvu min*»”*. Kial? Ĉar al tiu mortis la patro, kiu reprezentas la tradicion. Sed al tiu kiu volas enterigi la patron, nome respekti tiun tradicion, Jesuo rebatas: *“«*Lasu ke la mortintoj enterigu siajn mortintojn*»”*, do la tradicio estas mondo de mortintoj kiu devas esti mastrumata de la mortintoj, sed la homo kiu akceptas Jesuon devas tute malfermi sin al la noveco.

La samo por la lasta kiu diras: *“«*Mi sekvos vin, Sinjoro, sed permesu al mi ke mi prenu forpermeson de miaj samhejmuloj*»”*. Jesuo diras, *“«*Nneniu kiu prenas la plugilon kaj poste rigardas malantaŭen, estas taŭga por la regno de Dio*»”.*

La nova realo de la Regno ne permesas nostalgiojn pri la pasinto, la nova vino postulas novajn felsakojn.